Kongresa numero 2. Eldonnombro 3500 ekz.

„Mutig vorwärts!“

Aŭstria Esperantisto

„Kuraĝe antaŭen!“

(Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Int. Esperanto-Muzeo kaj Aŭstria Esperanto-Asocio

Abonprezo (komencebla ĉiumonate) por Aŭstrio ŝ 4.60, daŭrebla ankaŭ en partpagoj (½ j. ŝ 2.35), aliaj landoj sv. fr. 3.75; ponumere 45 g (1 resp. kup.).

Aperas la 5. de ĉiu monato. Leteradreso: Wien, I., Neue Burg (Tel. R-27-803). Manuskriptojn ni nur resendas kun reafranko. Poŝtŝparkaso-konto D-123.826.

Ne ĝustatempa malmendo de nia gazeto devigas al plupago de la jarkotizo por la sekvonta jaro.

No 2 (127 en la vico) Korneuburg ĉe Wien, la 5. de februaro 1936. 13. jaro



Eminenco

D-ro Theodor Innitzer.

Kardinalo-Ĉefepiskopo de Wien,

longjara amiko al Esperanto,

en sia konate afabla maniero konsentis celebri la

Pontifikan Meson

dum 28-a Univ. Kongreso de Esp. en Wien, la 9. de aŭgusto.

+ Th. Kard. Innitzer

La Esperanto-Kongreso en Wien, kiu okazos en la venonta somero, signifos en la mondlingva movado denove paŝon antaŭen, paŝon pli proksime al la interpaciĝo de la popoloj kaj al la mondpaco. — Estu ĝi benata kaj kronata de sukceso!

Wien, la 27. januaro 1936.

† Th. Kard. Innitzer m. p.
ĉefepiskopo.

La Festludoj en Salzburg.

La ideo okazigi Festludojn en Salzburg estas jam tre malnova. Jam 1842 estis aranĝita unua Mozart-festo. Kaj de tempo al tempo ripetiĝis ĉi tiuj muzikfestoj ĝis en 1918 fondiĝis Festlud-komunumo kaj en 1920 la unuan fojon estis prezentita „Ĉiu" de Hoffmannsthal en la enscenigo de Max Reinhardt. De tiu tempo la festludoj ĉiam pli evoluiĝis. Oni prezentis koncertojn, serenadojn, operojn, dramojn ktp. kaj la famo de la festludoj iris tutmonden. Tiel okazis, ke Max Reinhardt, la nekronita reĝo de Salzburg, kiel oni lin ofte nomas, gajnis por siaj prezentadoj la elitajn aktorojn el tutmondo kaj tiel igis la Festludojn de Salzburg „afero de tuta Eŭropa kulturo".

La festlud-salonegoj estas vidindajo, unuavice Festludejo, miraklo, kiu montras unuigite pasintan kaj nuntempan artojn, nobla monumento de aŭstria arto kaj tekniko. Tute unika la subĉiela rajdejo kun la preskaŭ 100 loĝioj, elhakitaj en la rokmuro de Mönchsberg (monto), en kiu siatempe okazis peladoj de sovaĝaj bestoj, turniroj ktp. kaj kiu nuntempe estas uzata por subĉielaj prezentadoj. Krome la iama vintrorajdejo kun la kolosa plafonpentrajo de Rottmayr, alikonstruita por kongresoj kaj festoj. Sed la plej belan teatro-salonegon donas la placo antaŭ la katedralo, kiu estas intime ĉirkaŭita de la festa harmonio de suda konstruarto kaj al kiu la monumenta preĝejo, la alte sur la monto situita Hohensalzburg, donas supertere belajn kulisojn.

Jen la programo de la Festludoj, kiuj okazos de 25. julio ĝis 31. aŭg.: **Operoj:** „Fidelio" de Beethoven, „Falstaff" de Verdi kaj Majstrokantistoj de Wagner sub la direktado de Arturo Toscanini; „Don Giovanni" de Mozart, „Tristan kaj Isolde" de Wagner, „Orpheus kaj Euridyke" de Gluck kaj „Corregidor" de Hugo Wolf sub la direktado de Bruno Walter; „Cosi fan tutte" kaj „Edziĝfesto de Figaro" de Mozart sub direktado de Felix von Weingartner.

Dramoj: „Ĉiu" de Hoffmannsthal kaj „Faŭsto" de Goethe sub direktado de Max Reinhardt.

7 orkestroverkoj de Vienaj Philharmoniker sub la direktado de Arturo Toscanini, Bruno Walter, Felix von Weingartner kaj Pierre Monteux.

Katedralaj koncertoj kaj **Mozart-serenadoj.** Prezoj indikotaj en la venonta numero. Baldaŭa mendo necesa. Ni peros ilin! Turisma Servo.

„La Blanka Ĉevaleto" invitas!

La 14. de februaro je la 22h 50 — 23h 10 el Radio-Wien.

Geaktoroj: gekantistoj Ingeborg Huber, s-ro Haimböck.

Ĉe la piano: muzikestro Göstl.

Klarigoj pri la opereto kun kantoj!

En marto parolos el **Radio-Wien** lernejdirektoro e. p. **Franz Menacher** pri „Wien, la kongresurbo".

Aŭskultu ĉiun merkredon inter 18 h 50 ĝis 19 h la informojn pri la Kongreso.

Kongreskarto aldonita por la pagintaj kongresanoj. Bonvolu afable **resendi aldonitan karton nur kun via subskribo kiel** presajon por kvitanci la ricevon.

Soneto al Vieno.

De Ivonne Stepan.

Hejmece ĉiam vi salutas min,
Dum fremdajn urbojn reve mi rigardas,
Sekrete en la kor' deziroj ardas,
Rigardi en arbar-ornamo vin.

Neniam vidis tiajn ĉarmojn mi
En urb' alia. — Kiel flor-odoro
Kaj kiel violona son' en koro
Gracie, flate min karesas vi.

Kaj ĉio, kio do konfuzis min,
Kaj kion kun sopir' mi porti devas,
Per vi mi plenumita ĝin ricevas.

Kaj tiu ĉi ekkon', ke sole vin
Esence do mi aparteni devas,
Dumvive, vere plej ĝojigas min.

Trad. Alois Norbert.

La Registaro de Aŭstrio

invitis la **esperantistaron el tutmondo al 28-a Universala Kongreso** de Esperanto kaj invitis la **Registarojn** pere de siaj ambasadoroj kaj ĝeneralkonsuloj al partopreno en la prelegserio pri la temo **„Kulturaj kaj ekonomiaj problemoj de Mezeŭropo"** en la kadro de **„12. Esperanto Somera Universitato".**

Oficejo de Kanceliero.
Eksteraj Aferoj.

Wien, la 24. januaro 1936.

Nombro 34.507 — 13/36

Al Preparanta Komitato por la 28-a Universala Kongreso de Esperanto

en

Wien.

La Oficejo de Kanceliero, Eksteraj Aferoj, havas la honoron komuniki al la Preparanta Komitato por la 28-a Universala Kongreso de Esperanto rilate al ĝia skribaĵo, nombro 437 de 21. novembro 1935, ke la Reĝa Greka Ministro por Eksteraj Aferoj komisiis la sekretarion de la Reĝa Greka Ambasadorejo en Wien, sinjoron Paŭlo Giannelia, pri la oficiala reprezentado dum la 28-a Universala Kongreso de Esperanto.

Por la federacia ministro: Hornbostel.

Al Somera Universitato sin anoncis: **La Registaroj de Aŭstrio, Bulgarujo, Grekujo.**

Kongresejo: la salonegoj de iama imperiestra kastelo en Wien, Neue Burg.
Leter- kaj telegramadreso: Esperanto, Wien, Hofburg.
Honora Komitato: Prezido: Federacia Kanceliero de Aŭstrio **d-ro Kurt von Schuschnigg.**

Membroj:

Ministro por Financoj: D-ro Ludwig Draxler,
Ministro por Eksteraj Aferoj: Barono Egon Berger-Waldenegg,
Ministro por Komerco kaj Trafiko: Fritz Stockinger,
Ministro por Internaj Aferoj: Eduard von Baar-Baarenfels,
Ministro por Socia Prizorgo: Univ.-Prof. D-ro Josef Dobretsberger,
Ministro por Terkulturo kaj Forstekspluato: D-ro Inĝ. Ludwig Strobl,
Ŝtatsekretario por Instruado: D-ro Hans Pernter,
Ŝtatsekretario por Landa Defendo: Generalo de Infanterio Wilhelm Zehner,
Urbestro de Wien: Eksvickanceliero Richard Schmitz,
Landestro de Karintio: Marŝal-leŭtenanto Barono Hülgerth,
Landestro de Malsupra Aŭstrio: Eksministro Josef Reither,
Landestro de Supra Aŭstrio: D-ro Heinrich Gleißner,
Landestro de Stirio: D-ro Karl Maria Stepan,
Landestro de Tirolo: D-ro Josef Schumacher,
Prez. de Federacia Kulturkonsilantaro: Univ.-Prof. D-ro J. Bick,
Prez. de Federacia Ekonomikonsilantaro Eichinger,
Rektoro de Universitato Wien: Univ.-Prof. D-ro Oswald Menghin,
Rektoro de Teknika Altlernejo Wien: Univ.-Prof. Inĝ. Franz List,
Rektoro de Altlernejo por Mondkomerco: Prof. Franz Dörfel,
Rektoro de Akademio por Belaj Artoj: Prof. D-ro Inĝ. Clemens Holzmeister,
Rektoro de Veterinara Altlernejo: Prof. D-ro Franz Zaribnicky,
Princino Fanny Starhemberg, delegitino ĉe Ligo de Nacioj,
Gubernatoro de Poŝtŝparkaso: Ekskanceliero D-ro Karl Buresch,
Prezidanto de Donau-Dampfschiffahrts-Gesellschaft: Eksvicekanceliero Emil Fey.

Novaj Helpantoj en la kongreslaboroj: Venos pli frue por helpi s-ino Schwartz-Jägerndorf kaj f-ino Siri Bergström, Oernsköldsvik. El Wien: Josefine Stöckl kaj fakinstr. Otto Drössler.

Kongreskotizoj:

Favorkotizoj, **validaj ĝis 30. de aprilo:**

I. Kongresano . . . . . svisaj fr. 23.—
II. Kotizo por familianoj de kongresano . . . . . „ „ 14.25
III. Kotizo por gejunuloj malpli ol 18-jaraj . . . . . „ „ 9.50
IV. Kotizo por helpkongresanoj, kiuj ricevos ĉiujn dokumentojn, sed ne sendos reprezentanton . . . . . „ „ 12.—

Pri enpagmaniero **rigardu kongresnumeron I.**
La plena programo de la Kongreso en la marta numero.

Dua listo:

RIMARKOJ:

La kongresnumeroj estas laŭ ordo de la alveno de ĉiu aliĝo (kun la plena necesa kotizo) al LKK.
En la listo estas markitaj: per la signo (UEA) la komitatanoj de UEA,
per la signo (LKK) la membroj de LKK,
per steleto (*) la kunlaborantoj en la kongreslaboroj,
per 2 steletoj (**) la institucioj, entreprenoj, grupoj ktp., aliĝintaj kiel helpmembroj,
per la signo (Bl) la blinduloj.

1. Roome George W., instr., Sheffield.
2. Roome Nellie, s-ino, Sheffield.
3. Foulds Rebecca, s-ino, Sheffield.
4. Foulds Wil., farmaciisto, Sheffield.
5. Falk Alice, Wien.
6. Marechal Jean, ferv. desegn., Paris.
7. Chapellier Jean R., ferv. des., Auboué.
8. Jimel Karl, gimnaz., Wien.
9. Bis František, dentisto, Praha.
10. Hamaker C. M., Hilversum, Nederl.
11. Hamaker van Haeften C. M. H., s-ino, Hilversum.
12. Daly Eileen de B., komerc-ino, Bordiglioni, Ital.
13. Hodge Edith I., komerc-ino, Bordiglioni.
14. Vonlanthen Arnold, poŝtofic., Bern.
15. Heidl Gottfried, fervojisto, Linz.
16. Bouix Jules, desegn., Levallois-Perret.
17. Bouix Marthe, s-ino, Levallois-Perret.
18. Plaisance s-ino, Nancy.
19. Schmitt Margueritte, s-ino, Nancy.
20. Schmitt Eugène, profesoro, Nancy.
21. Marteau Andrée, lernhelpantino, Tours.
22. Marteau Germaine, instr.-ino, Tours.
23. Ambroise Charles, Thouars, Franc.
24. Weiss Hanna, instr.-ino, Gross Tajax.
25. Vávrovský Josef, landa del. de Int. Polica Ligo, ĝendarmo e. p., Praha.
26. Beran Emil, staciestro, Lázně Bělohrad.
27. Kratochvila Johano, lern.-dir., Sered.
28. Kratochvila Elizabeto, s-ino, Sered.
29. Jacobs Elise, Flensburg, Germanujo.
30. Šprušanský Josef, detekt. insp. de štata polico, Komarno, ČSR.
31. Naquin Clarisse, dir-ino de lernejo, St. Etienne, Franc.
32. Bl. Oehner August, Wels, Aŭstrio.
33. Bloch Robert, gvid. de Neŭtrala Centro de Esp., poŝta ofic., Praha.
34. Schwengler Franz, komerc., Wien.
35. Huber Oskar d-ro, kurac., Uetendorf apud Thun, Svisl.
36. Höfer d-ro Max, ferv. konsil., Wien.
37. Höfer d-ro Hans, fizikisto, Wien.
38. Benisch Marianne, instr-ino, Leitmeritz.
39. Weleminsky Jenny, s-ino, Praha.
40. ** Esperanto-societo „Danubio“, Wien.
41. Hein Robert, fak-instr., Klosterneuburg.
42. Ford Nesta, Bournemouth, Angl.
43. Willison K., f-ino, Birmingham.
44. Norman Eleanor, instr-ino, Birmingham.
45. Jackson James F., Willaston, Angl.
46. Jackson H. E., s-ino, Willaston.
47. Jones Mair, lernejestrino, Neath, Kimrujo.
48. Ashby E., f-ino, Birmingham.
49. Meredith B., s-ino, Birmingham.
50. Steeves de Z., Ledsham, Angl.
51. Steeves de Z., C., s-ino, Ledsham.
52. Worden E. W., f-ino, Bishop Auckland.
53. Sinclair Patricia C., f-ino, Buckhaven, Skotl.
54. Gueritte Alfred Tony Jules, konstruisto-ing., Surbiton, Angl.
55. Beaumont Maggie, f-ino, Huddersfield.
321. Lawton Hilda, f-ino, Huddersfield.
322. Chaundy Elsie G. R., instr.-ino, Oxford.
323. Wheatley Evelyn Maud, instr-ino, Birmingham.
324. Früh Alice, ferv. ofic., f-ino, St. Gallen.
325. Plehn Hans Joachim, tekn. oficejestro, Wieselburg, Aŭstrio.
326. Witosz Zofie, prokuristino, Neu-Oderberg, ČSR.
327. Hornblow Edgar Andrew, ŝtatofic. en Eduka Departemento, Wellington, Novzelando.
328. Hornblow Joan Catherine, Wellington.
329. Thomas Louis, inĝ., Myszkow, Polujo.
330. Hallerström Tore Hjalmar, komerc., Vingaku, Svedujo.
331. Fredriksson Gösta, laboristo, Högsjö,
332. Eriksson Karl, laboristo, Högsjö, Sved.
333. Sjölin Yngve, laboristo, Högsjö.
334. Witz Milly, s-ino, Praha.
335. Agourtine L., ĵurnalisto, Paris.
336. Palíková Maria, Krnov, ČSR.
337. Slepička Josef, ferv. ofic., Čičenice, ČSR.
338. Lagenès Léa Juliette, ofic.-ino, Toulouse.
339. Wannek Karl, dir., Linz.
340. Mraz Josef, fakinstr., Linz.
341. Steinkellner Jakob, fervojisto, Knittelfeld.
342. Zant Hans, instr., Steinakirchen a. F.
343. Zant Dorothea, s-ino, Steinakirchen.
344. ** Esperanto-Klub, Wien.
345. Andersson Art., kondukt., Malmö, Sved.
346. Lindvall Agda, f-ino, Malmö.
347. Nilsson Harry, komerc., Malmö.
348. Heilskov Christ, verkisto, Laurbjerg, Danujo.
349. Komerca Ĉambro, Boulogne s. Mer.
350. Gleixner Joh., parohestro, Großpoppen, Aŭstrio.
351. Kristensen R., Edslev Molle, Dan.
352. Iversen Vikt., Edslev.
353. Baroch Marie s-ino, Slezska Ostrava.
354. Donner Jos., K., ŝpark. ofic., Plan, ČSR.
355. Donner-Richter Mitzi, s-ino, Schwertberg, Aŭstrio.
356. Hérion Joseph, juvelisto, Verviers, Belgujo.
357. Hérion Andrée, s-ino, Verviers.
358. Harrer Alf., Wr.-Neustadt, Aŭstrio.
359. Nevell Leon Noel Mansell, instr-isto, Khartoum, Anglo-Egipta Sudano, Afriko.
360. Nevell Marianne, s-ino, Khartoum.
361. Kangur Elfriede, s-ino, Nomme, Estonujo.
362. Judelovič Boris, vendisto, Rakvere, Eston.
363. Zlaff Gerda, f-ino, komerc-ino, Rakvere.
364. Tulp Hilja, f-ino, instr-ino, Tallinn.
365. Avik Johanna, Tallinn.
366. Blees Helga, instr-ino, Haapsalu, Eston.
367. Larue Paul, ofic., Paris.
368. Jeangirard Marguerite, honora profesorino, Paris.
369. Jeangirard Henriette, f-ino, Paris.
370. Dubois Hélène, honora profesorino, Paris.
371. Urion Yvonne, f-ino, Colmar, Franc.
372. Issler Anne-Marie, f-ino, Colmar.
373. Pauvrehomme Louis, emeritulo, Toulon.
374. Pauvrehomme Lucie, s-ino, Toulon.
375. Vanhersecke Daniel, kontisto, Dunkerque.
376. Vanhersecke Lucienne, s-ino, Dunkerque.
377. Dardarin Anne-Marie, instr-ino, Thouars, Francujo.
378. Couffinhal Pierre, emer. prof., Lacépède, Francujo.
379. Beau Benoit, prof., Mâcon, Francujo.
380. Boncenne Alfred, emeritulo, Levallois-Perret, Francujo.
381. Lefloch, s-ro, Paris.
382. Cozic Louis, inĝ., Vanves, Franc.
383. Cozic Marguerite, doktorino pri sciencoj, Vanves.
384. Isnard Henri, marina ofic., Marseille.
385. Caudel Madeleine, artpentristino, Paris.
386. Hammond Roger Edm. Alf., ŝtatofic., Paris.
387. Heim Josef D., priv. ofic., Bucuresti.
388. Moller Poŭl, farmaciisto, Kopenhagen.
389. Moller Irmgard, s-ino, Kopenhagen.
390. Schwarz Elise, s-ino, Jägerndorf, ČSR.
391. Hand Viktorine, lern. direkt-ino e. p., Wien.
392. Crébely Louis Jos. Justin, ferv., Toulon.
393. Crébely s-ino, Toulon.
394. Crébely juna, Toulon.
395. Herzog Anjo, f-ino, Königinhof, ČSR.
396. Felt Václav, admin. de kino, Zlaté Moravce, ČSR.
397. Lešinger Stanislav, ĉe farmacio, Praha.
398. Barešova Ada, poŝtofic-ino, Praha.
399. Rosenstock d-ro Stanislaus, advok., Zagreb.
400. Waldén Klara, instr-ino, Ystad, Svedl.

Laŭlanda resumo: Alĝerio 1, Anglujo 47, Aŭstralio 2, Aŭstrio 138, Bulgarujo 4, Belglando 4, Ĉeĥoslovakio 37, Danlando 6, Egipta Sudano 2, Estonujo 17, Finnlando 1, Francland 56, Germanlando 8, Hungarlando 5, Irlando 2, Italland 9, Jugoslavio 1, Katalunujo 1, Nederlando 21, Nederlanda Hindujo 1, Pollando 8, Rumanlando 10, Skotlando 4, Svedlando 9, Svislando 5, Usono 1. Entute aliĝis 450 personoj el 26 landoj!

Al LKK de 28-a, Wien.

E.-Soc. „**Danubio**“, festanta en tiu ĉi jaro la 25-jaran jubileon de sia ekzisto, decidis en sia ĝenerala kunveno, okazinta lunde, la 27. de januaro, aliĝi kiel helpmembro k o r p o r a c i e al la 28-a Univ. Kongreso de Esp.

Ĝi volas per tio akcenti la neceson de harmonia kunagado de l'tuta aŭstria esperantistaro kaj firmigi kaj certigi la sukceson de tiu plej grava esperantista aranĝo, kia estas Universala Kongreso de Esperanto.

Ĝi esperas, ke ĝia ekzemplo trovos multflanke imiton.

Kun samideanaj salutoj signas por la

Esperanto-Societo „Danubio“:

R. Cech, prez. Franz Vasta, sekr.

Fakaj kunsidoj (daŭrigo):

Sanitaristoj (hospitala civila kaj militista helpistaro); adreso: Josef Schäfer, Wien, XVIII., Weitlofgasse 15/21.

Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio (TEKA). Adreso: Esperanto-Kongreso, Wien, I.

Fervojistoj (Gottfried Heidl, fervoja konduktoro, Linz a. d. D., Waldeggstr. 52, Aŭ.



Hallstadt ĉe belega samnoma lago.

Tra Aŭstrio.

Grandstila vojaĝo per aŭtobusoj, por bone vidi kaj plene ĝui la vidindaĵojn de Aŭstrio.
(Turisma Servo sub la aŭspicioj de UEA) A r a n ĝ a n t o: Intern. Esperanto-Muzeo, Wien.
(Sekcia ĉefo d-ro Uebelhör kaj kortega kons. Steiner.)

Certe vi havas la intereson konatiĝi kun la bela lando en la koro de Eŭropo, kie la registaro vin ekkore salutos kaj jam nun bonvenigas kaj kie ni festos ĉi-jare la 28-an Univ. Kongreson de Esperanto—en Aŭstrio!

Sur tia malgranda teritorio nenie en la mondo vi povos vidi tian variecon en la pejzaĝo kaj ne tiel baldaŭ vi havos okazon, travojaĝi Aŭstrion tiel malmultekoste kiel per nia ekskurso A.

Jen mallonga programo, ĉar tute prisskribi, kio vin atendos, ne estas eble! Venu, rigardu kaj ĝuu la belegajn rememorojn dum via tuta vivo!

5. **aŭg.** kolektiĝo de la A-ekskursanoj en la fama urbo **Salzburg**, naskiĝloko de Mozart, urbo de Festludoj mondfamaj.

6. **aŭg.** aŭtobuse rigardo de la 5 km distanca frubarokstila kastelo Hellbrunn (el 1613), ties salonegaro, parko (la plej malnova barokstila en germanaj landoj) kun la mondfamaj akvo-artaĵoj; vizito de urbo Salzburg, „Norda Roma“ kun memorlokoj al Mozart, katedralo „la plej pura italstila konstruaĵo monumenta en Eŭropo norde de Alpoj“; benediktana abatejo Sa. Petro el 596, la „lulilo de Salzburg“ kun katakomboj el 3. jarc., tiam rifuĝejo de la unuaj predikantoj por la kristana kredo ktp. — Ni aŭskultos la famaan sonoril-ludon de la rezidej-turo kaj la orgenon de la fortikaĵo Hohensalzburg, kiun ni vizitos posttagmeze, la plej potencan fortikaĵon sur germana tero, 130 m super la urbo. — Vespere hejmeca kunestado: naciaj kostumoj, dancoj kaj kantoj.

7. aŭg. Per apartaj komfortaj aŭtobusoj de Salzburg trans Gaisberg (1288 m) kun belega panoramo al Salzburg kaj la lagoj, kiujn ni poste preterveturas: Fuschl-lago, St. Gilgen kaj Strobl, pitoreskaj lokoj ĉe Wolfgang-lago (tie ludas la kongresteatraĵo „La blanka ĉevaleto“) banloko Ischl, iama somerrezidejo de imperiestro Franz Josef; Ebensee kun salminejo, elirpunkto per kablofervojo al Feuerkogel (1200 m altecdiferenco); Gmunden, fama banloko ĉe Traun-lago; urbo Wels al Linz, ĉefurbo de Bruckner-lando. Aparta teatroprezentado.

8. **aŭg.** daŭrigo al fama abatejo Melk, sur alta roko; vizito al la belega barokstila preĝejo, biblioteko, ĉambraro.

Alveno en Wien 16 h.

Samvespere komenciĝas la Kongresprogramo, kiu finiĝos la 15. aŭg. posttagmeze.

Daŭrigo de Ekskurso A:

15. aŭg.: Post la tagmanĝo forveturado de Wien per niaj aŭtobusoj, preterpasante la miljaran urbon Mödling, kuraclokojn Baden kaj Vöslau, antikvan urbon Wiener Neustadt al Semmering, 1000 m alte situita kuracloko (belega panoramo, ludkazino, banejo), poste al Graz, la ĉefurbo de „Verda Stirio“ (Steiermark), preterpasante la urbojn Mürzzuschlag kaj Bruck — ambaŭflanke akompanataj de montoj. **Alveno en Graz je la 18 h.** Hejmeca vespero ĉe komuna vespermanĝo.

16. aŭg.: Vizito al belega ĝardenurbo Graz: malnova universitato, barokaj kaj renesancaj konstruaĵoj kaj la karakteriza ekkonilo de Graz, la horloĝturo sur Schloßberg (monto), kie ni tagmanĝos ĝuante la belegan panoramon. De **Graz** sur nova alpoŝoseo preter Köflach kaj Pack (1115 m alta), kastelo Waldenstein, urbeto Wolfsberg (jam en Karintio) kaj Völkermarkt al **Klagenfurt,** la ĉefurbo de Karintio. Klagenfurt, estiĝinte en la 12-a jarc., enhavas interesajn preĝejojn kaj palacojn el diversaj epokoj. — Vespere hejmeca aranĝo: naciaj kostumoj, kantoj kaj dancoj. — Inaŭguro de **Esperantostrato.**

17. aŭg.: matene laŭlonge de Lago de Wörth, preterpasante la belegajn lokojn Maria Wörth, Krumpendorf, kaj Reifnitz, al urbo Villach ĉe Drau-rivero. Poste al kuracloko Warmbad-Villach, kie vi havos okazon ĝui terman banon en halego aŭ sub ĉielo. Plue ni preterpasos la lokojn Möllbrücke, Greifenburg, Ober-Drauburg ĉiam en la valo de Drau-rivero, ambaŭflanke altaj montoj, kaj atingas Lienz, la unuan urbon en Tirolo (676 m super la maro). Tie ni tranoktos. Sed **la unuaj aliĝintoj havas la apartan feliĉon daŭrigi la** vojon samtage trans Iselsberg al la bela mirakl **Heiligenblut** (1370 m), kie la novkonstru **Großglockner Altalpa Ŝoseo** komenciĝa **Apenaŭ alia alpoŝoseo** prezentas tiom d **grandiozaĵo kiel ĉi tiu, kiu** transversas l **potencan rokaron de Hohe** Tauern en long **de 41 km** kaj peras novan rilaton inte nordo kaj sudo.

Esperanto gvidilo pri Großglockner Al **alpa Ŝoseo** estis aldonita por la kongresanoj al la kongres-numero 1.

Daŭrigante la vojon ni atingas Gro **glocknerhaus** (2131 m), parto **daŭrigos** l veturadon ĝis **Franz-Josefs-Höhe.**

Nur la unuaj sin anoncintoj povo **tranokti en unu el la tranoktejoj** en Franz **Josefs-Hütte (2362 m),** Großglocknerhau **(2143 m), Heiligenblut** (1370 m), la ali **devos resti en Lienz (676 m),** ĉarma lok **Ju pli alte vi tranoktos,** des pli bela est **la unika spektaklo de la sunleviĝo!** Kro la tranokto en suralpaj gastejoj kaj kaban donas apartan ĉarmon kaj la plejmulto vi certe neniam estis en suralpa kabano!

18. aŭg.: La aliaj partoprenantoj, an zinte sin vespere en Lienz, frumatene fara la priskribitan vojon, renkontos la unua en Großglocknerhaus aŭ Franz-Josefs-Hö ĝuos kun ili la **majestan Glockner-panor mon** kun **Großglockner** (3798 m) kaj aliaj tri-miluloj kaj eĉ povos supreniri k kajn paŝojn la plej grandan glaciejon orientaj Alpoj **„Pasterze“.** La veturado sur Großglockner ni ne povas priskrib Legu la gvidilon kaj **vi certe havos la ega deziron partopreni en ĉi tiu vere unik veturado „Tra Aŭstrio“!**

Tra belega pejzaĝo ni atingas la mon faman Zell am See, situitan ĉe la samnom lago, kaj tagmanĝos. **Parto** certe de **uzos la rapidtrajnon,** por veturi okcident en la direkto al sia hejmlando, la ali **daŭrigos** la veturadon trans belega Lof kaj **Reichenhall en Bavarujo** al Salzburg kie ni alvenos vespere kaj de tie ili pov forveturi norden aŭ resti ankoraŭ en Salz burg, por ĝui la Festludojn.

Por ebligi ankaŭ al la samideanoj Ĉeĥoslovakio, Hungarujo, Polujo, Litovu Latvujo, Finnlando, Estonujo, Jugoslavi Bulgarujo, Rumanujo ktp. la partoprenon ĉi tiu malmultekosta vojaĝo, ni aranĝos po ili la saman vojaĝon, **komencante la 15. aŭ en Wien,** do **post la Kongreso** kaj **kune k la karavano, kiu eliras** de Salzburg! **veturado de Wien trans** Graz—Klagenfurt **Großglockner ĝis Salzburg** estos komun poste **sekvos la sama programo,** kiu okaz **de 5.—8. aŭg. kaj havos** finon en Wi **la 21. aŭg.**

Al ĉi tiu Ekskurso, kiu eliros de Wie ankaŭ jam aliĝis aro da kongresanoj, int ili **4 membroj de Familio** Zamenhof.

Ekskurso A donos al vi: Aŭtobusve radon tra Aŭstrio, 6 tranoktojn, 6 mate manĝojn (kafo aŭ teo kun butero aŭ fru taĵo, ovo kaj pano), 6 tagmanĝojn (sup rostaĵo, farunaĵo, pano), 5 vinĉojn ant tagmezajn (bulko kun butero kaj ŝinko fromaĝo laŭ elekto), posttagmezan kaf **kun kremo kaj bulko sur** Hohensalzburg 6 vespermanĝojn (viandon kun aldon



Dachstein kun la mondfamaj grotoj.

...romaĝo aŭ farunajo, pano; por la el Zell ...m See hejmen veturontoj „manĝopakaĵon“ ...or manĝado dumvoje en la trajno), eniron ...n kastelo Hellbrunn (ĉambraro, parko kaj ...kvoartajoj), fortikaĵo Hohensalzburg, aba...ejo Melk ktp., rondveturadon en Graz, ...ajimposton trans Gaisberg kaj Groß...lockner ktp.

Por **vegetaranoj** apartan manĝon post ...taŭa mendo; por **alkoholkontraŭuloj:** ...endu nian klaran, bonan akvon, nenia ...evigo trinki alkoholaĵojn!

Prezoj: **svis. fr. 115.—**, en civile bona ...telo sv. fr. 110.— kaj en tre bona hotelo ...v. fr. 124.— (trinkmono enkalkulata!).

Pro la **festludoj en Salzburg** nur parto ...povos tranokti tie en hoteloj, ĉar la prezoj ...am estas terure altaj. Pro tio parto loĝos ...ivate kaj alia en la najbaraj lokoj, kien ili ...veturos per niaj propraj aŭtobusoj.

En **Klagenfurt** ĉe grandnombra parto...reno ankaŭ ne ĉiuj povos tranokti, sed ili ...veturos post la vesperaj aranĝoj per niaj ...tobusoj al la najbaraj lokoj, situitaj ĉe ...ago de Wörth, kaj povos iomete pli mal...ue ellitiĝi.

Sur **Großglockner** (Franz-Josefs-Hütte, ...roßglocknerhaus kaj Heiligenblut) aro ...povos tranokti en komunaj ĉambroj (tia ...anoktiĝo estas tre bone konata al turistoj ...j ankaŭ tre ŝatata).

Ekskurso B: **7-taga restado en Wien mem.** ...donos al vi: 7 noktigojn, 7 matenmanĝojn ...el sub Ekskurso A), 6 tagmanĝojn ...Eksk. A), posttagmezan kafon sur Kahlen...rg, 6 vespermanĝojn kaj **ekskursojn D** ...tobuse al plezurkastelo Schönbrunn, ...zito de la salonegaro aŭ bestĝardeno, ...lega parko kun ruino ktp.) aŭ **E** (aŭto...se al Klosterneuburg, urbo proksima de ...ien, vizito de la fama abatejo, bordbanejo ...Danubo), poste **eksk. F** (aŭtobuse supren ...Kahlenberg, monto kun belega panoramo ...Wien, poste sur nova strato al kastelo ...obenzl kun belega panoramo al Wien de ...ia flanko kaj fine al fama Grinzing, kie ...ĉe bona vino — aparte pagota — travivos ...lajn horojn ĉe popolmuziko kaj kanto), ...sk. G (veturado per ŝipo sur Danubo dum ...horoj kun muziko, danco kaj kanto) **aŭ H** ...eturado en grupoj al fama Prater kun ...muzaĵoj), poste **eksk. I** (rondveturado tra ...ien).

La prezoj: **svis. fr. 62.—**, en civile bonaj ...oteloj **sv. fr. 58.50**, en tre bonaj **sv. fr. 82.50** ...aj por 300 malbonvalutuloj en komunaj ...ambroj kun simpla matenmanĝo (bona ...io kaj bulko) nur **sv. fr. 39.—**.

Kompreneble ne estas necese, aliĝi al ...kurso B. Al ĝustatempe mendontoj ni ...avigos ĉambrojn en hoteloj kaj private.

Vi ankaŭ povos aliĝi al nur **unuopaj** ...anĝoj de **ekskurso B.**

Jen la prezoj: Ekskurso **D Schönbrunn** ...aŭtobuso, vizito al la kastelo aŭ best...ardeno) svis. fr. 1.60; **E Klosterneuburg** ...aŭtobuse, vizito al abatejo, bordbanejo) ...vis. fr. 2.70; **F Kahlenberg—Kobenzl—** ...Grinzing (aŭtobuse, posttagmeza kafo, ...espermanĝo ĉe muziko kaj popolkantoj) ...fr. 5.30; **G sur Danubo** (per ŝipo 3 horojn ...r Danubo, muziko, kanto, danco) ...fr. 1.20; **H Prater** (veturado al fama ...rater, kelkaj amuzaĵoj tie) sv. fr. 1.—; **...rondveturado en Wien sv. fr. 2.10; ...Rax—Semmering** (aŭtobuse al la val...acio de Rax-monto, 2009 m alta, per kablo...rvojo supren al Rax, tagmanĝo, reveturo ...er kablofervojo, aŭtobuse al Semmering, 1000 m alta, fama somerrestadejo, ludkazino, belega panoramo, reveturo, vespermanĝo dumvoje; tuttaga eksk.) sv. fr. 17.— (ege rekomendinda, ĉar multaj en sia lando certe ne povos ĝui tiajn belegajn panoramojn kaj veturi per kablofervojo!); **L Schneeberg** (2075 m, per trajno al Puchberg, dentrad-fervojo al Hochschneeberg, diservo, tagmanĝo, ekskursetoj, reveturo per dentrad-fervojo kaj fervojo, vespermanĝo en Puchberg; tuttaga) ege rekomendinda por tiuj, kiuj deziras ĝui belegan panoramon, sv. fr. 11.25; **M Mödling—Heiligenkreuz—Baden** (aŭtobuse Mödling, Beethovenmemorajoj; Heiligenkreuz, 800-jara abatejo; fama kuracloko Baden, vizito de sulfur-banejoj, Romana fonto, belega parko, koncerto, ludkazino, bordbanejo, tagmanĝo, vespermanĝo, tuttaga) sv. fr. 7.75; **N Melk** (per fervojo al Melk, rigardo de la abatejo, tagmanĝo, reveturo per ŝipo sur Danubo tra Vaĥaŭ, vespermanĝo, tuttaga, restado en Dürnstein kun ruino, kie la angla reĝo Rikardo Leonkoro estis malliberigita, sv. fr. 8.50; **O Eisenstadt—Forchtenstein—Wiener Neustadt** (aŭtobuse Eisenstadt, Haydn-memorajoj, antikva kastelo Forchtenstein, tagmanĝo, reveturo, vespermanĝo; tuttaga) sv. fr. 9.—.

Krome kompreneble ĉiu povos veni al la kongreso per fervojo. Rabatoj jam konsentitaj de germanaj, ĉeĥaj, hungaraj, francaj, italaj, aŭstriaj fervojoj kaj de Donau-Dampfschiffahrtsgesellschaft. Detaloj sekvos.

La pagojn sendu kun la kongreskotizo al „Erste österreichische Spar-Casse, Wien Konto de Aŭstria Poŝtŝparkaso en Wien A 158.950/2708 (28. Esperanto-Weltkongreß)“ aŭ al Esperanto-Kongreso, Wien, I., Neue Burg. Turisma Servo.

Fakkunsido pri Esperanto-stenografio.

Ĉiuj Esperanto-stenografiistoj estas invititaj, partopreni tiun fakkunsidon. Gi konsistos el du partoj.

a) Teoria parto: Generala diskutado pri internacia Esp.-stenografio. Diskutado de sistemaj demandoj kaj prezentado de diversaj sistemoj versajne ne povos okazi pro manko de tempo.

Sed la aranĝantoj de la fakkunsido intencas kolekti materialon kaj proponojn por posta studado, eventuale per elektota komitato de fakuloj.

b) Praktika parto: Stenografia netskribo de presita teksto kaj skribkonkurso laŭ dikto, per diversaj sistemoj. Principe estos allasita ĉiu sistemo, sub la sola kondiĉo, ke Esperantlingva klarigo de la koncerna sistemo estu sendita al LKK de 28-a ĝis la 1a de Julio 1936.

Interesiĝantoj bonvolu anonci sin, spertuloj estas petitaj, sendi raportojn pri spertoj kaj instigojn por aranĝoj.

E. Werner, ŝtate ekzam. instr. de Esp. kaj sten.

Donacoj al la kongreskaso:

Sumo laŭ n-ro 1	ŝ	159.10
f-ino Studer, Wil	ŝ	3.40
f-ino Dardarin, Thouars	ŝ	8.70
s-ro Cozig, Vanves	ŝ	4.35
inĝ. Gueritte	ŝ	11.10
	ŝ	186.65

Donacoj al la blindulkaso:

Sumo laŭ n-ro 1	ŝ	27.11
f-ino Urion, Colmar	ŝ	1.74
f-ino Dardarin, Thouars	ŝ	8.70
s-ro Cozig, Vanves	ŝ	8.70
inĝ. Gueritte	ŝ	14.50
	ŝ	60.75



Linz, ĉefurbo de Supra Aŭstrio.

Robert Kreuz † subite

la 1. de februaro.

Terura perdo por nia movado! Ni funebras kun la familio kaj la Esperanto-Movado.

LKK. de 28-a, IEMW, AEA, AE.

Steiner.

18. Tutmonda Katolika Esperanto-Kongreso

de I. K. U. E. en Brno, ČSR.

4.—8. aŭgusto 1936.

La kongreso komenciĝos la 4. vespere kaj finiĝos matene de la 8. aŭg., por ke la kongresanoj povu ĝustatempe esti en Vieno, kaj ĉeesti la solenan malfermon de 28-a.

Ni kore deziras grandstilan aranĝon kaj esperas vidi vin ĉiujn poste en Vieno.

Kio estas Esperanto?

De C. M. Hamaker, Hilversum (Nederlando).

Ĉu lingvo, aŭ helplingvo?

Jes certe! Kaj unu, kiun ĉiuj povas lerni en la dekono de la tempo, kiun ili bezonas por la plej faciła alia lingvo.

Lingvo, kiu havas 2000 vortojn, radikojn, el kiuj per aro da pre — kaj sufiksoj, kiuj ĉiuj havas bone difinitan sencon kaj signifon, plej logike estas faratai ĉiuj aliaj 10.000 aŭ pli multaj vortoj, kiujn oni deziras uzi.

Lingvo, kiu vivas, intense vivas. Gia vortaro ĉiutage plidikiĝas pro novaj vortoj kaj esprimoj, kiujn ĉiu esperantisto tuj bone komprenas, ĉar ili estas formataj per la de li konataj sufiksoj kaj prefiksoj, kies senco kaj signifo por ĉiam estas fiksitaj. Tiun kreskadon kontrolas Lingva Komitato de 111 plej kleraj esperantistoj, sur la tuta mondo dislokitaj, kaj la el ili elektita, Akademio de 18 eminentuloj.

Lingvo, kies gramatiko ne okupas 2 paĝojn en malgranda libro; preskaŭ sen deklinacioj, sen genroj, sen esceptoj.

Lingvo, en kiu ne troviĝas literoj, kiujn iuj popoloj ne povus elparoli, kaj kies elparolo estas tiel genie reguligita, ke ĉiuj nepre devas egale elparoli ĝin, tiel ke per ĝi ĉiuj povas kompreni unuj la aliajn, la Anglo la Koreanon, la Eskimo la Patagonianon... Dudek sep mondkongresoj tion jam pruvis!

Lingvo, kiu transprenas ĉiujn ekzistantajn internaciajn (plej multe teknikajn) vortojn kaj esperantigante la ortografion, do ankaŭ la elparolon, igas ilin pli reale internaciaj ol ili iam estis.

Lingvo, per kiu la plej altspiritaj pensoj plej belege povas esti esprimataj.

La originala esperanta literaturo tion jam pruvis.

Ĉu lingvo, aŭ helplingvo? Jes certe; kaj **miraklo** inter la lingvoj.

Sed ankaŭ, Esperanto estas fenomeno, kaj fenomeno de pli ol pure homa origino.

Estas fenomeno logike naskiĝinta el, kaj perfekte harmoniante kun, la maniero, en kiu la homaro nekonscie, sed konstante faras sian evolucian iradon.

Tiu, kiu volas vidi tiun iradon de la homara evolucio, devas pripensi, ke komence ĝi estis dispartigata en malgrandaj reciproke malamikaj triboj, ekster kies limoj nek moralo nek juro validis por la proksimulo; ke ĉi tiuj malgrandaj triboj unuiĝis en pli grandaj, kiuj iom post iom fariĝis la popoloj, nun unuigitaj en Ligo de Nacioj.

Li devas memori la abolicion de la Servuteco, la sklaveco en la propra domo de la blankulo, 600 jarojn poste sekvita de la abolicio por la aliaj rasoj; la de Grotius ekkonitan Juron de la Popoloj, kies kodifikacio nun, 300 jarojn poste, estas entreprenata; la religian liberecon, kiu iom post iom anstataŭis la devigadon; la rekonon de la Rajtoj de la Homo politike, sekvita 100 jarojn poste de sama rekono ekonomie, per sociala leĝdonado, dum nun ni vidas la klaslimojn pli kaj pli malaperi; la kreskantan abomenon kontraŭ la milito; kaj tiom multajn aliajn.

Ni nomis kelkajn — mejlfostojn sur la longa malfacila vojo, pene trairata, ne sen multe da halto kaj refalo.

La pensanta homo, kiun la nuna periodo de profunda refalo ne malhelpas vidi, memorinte kaj pripensinte ĉi ĉion, certe devas ekkoni, ke la evolucio-irado de la homaro daŭre sin direktas al la ekkono de la fundamenta egaleco, egalvaloreco kaj egalrajtigiteco de ĉiuj homoj reciproke; al la Unueco!

Kaj, kiu tion komprenas, tiu ankaŭ senpere komprenos la altegan signifon de Esperanto kiel produktaĵo de tiu evolucio kaj kiel ilo por plue ebligi, almenaŭ faciligi, ĝin.

Ne, ĉar la genia Zamenhof okaze ŝatis okupi sin je la kreo de nova lingvo, sed ĉar la homaro novan lingvon nepre bezonis, Esperanto naskiĝis.

En tio, en la altaj origino kaj signifo de ĉi tiu lingvo troviĝas la klarigado de la alie ne bone komprenebla fenomeno, ke la Esperantistoj nomas unu la alian „samideano“, kaj tra la tuta mondo efektive konsideras unu la alian kiel tian kaj kondutas unu je la alia kiel tia, kvankam tamen tute ne ekzistas iu ajn ordiĝo nek asocio, kaj nenio estas krom simpla lingvo sole.

Tiu, kiu lernas kaj studas Esperanton, faras multe pli ol simple alpreni novan lingvon, helplingvon, kiu havigos al li multe da facileco kaj ĝuo.

Li fariĝas, sole pro la kono de tiu lingvo, tute senpere, ano de nedifinita frataro; la frataro de la vojpretigantoj por la evolucio-irado de la homaro, pere de la helplingvo, kiu ebligas konon kaj komprenon de ĉiuj reciproke, kiu estas la plej forta rimedo kontraŭ la nacia kaj rasa egoismo, kaj, pro tio, ankaŭ estas la plej potenca ilo por akiri la tiel sopiratan internacian kaj interrasan pacon!

Mirakla lingvo, kiel lingvo; sed ankaŭ ĉar ĝi unuigas la homojn, jam per sia esenco sole!

El Tutmondo.

Internacia Radio-Komisiono. — S-ro Juste Jensen, prezidinto de Internacia Radio-Komisiono, devis eksiĝi pro trookupiteco. Lian oficon transprenis, unuanime elektita de la estraro de UEA, s-o Gustav Henriksson, Helsingborg 3, Brommagatan 32, Svedlando, al kiu ĉiuj informoj pri okazontaj esp-aj radioparoladoj, kursoj ktp., devas esti adresataj.

Esperantistaj geedziĝoj.

Kun sincera ĝojo kaj plezuro ni eksciis pri la geedziĝo de fraŭlino Regina Lübeck estonino, kun samideano A. Emanuelsson en Boras (Svedujo).

Antaŭ kelkaj semajnoj geedziĝis en London fraŭlino Else Schütt (Berlino) kaj la samideano Alfred Rivier (Nice). La novaj geedzoj konatiĝis dum Internacia Kongreso kaj jen nova esperantista paro internacia.

Fraŭlino Vera Hakansson el Amål (Svedujo) kaj Willy Burgermeister el Warnsdorf (Ĉeĥoslovakio), sciigas sian geedziĝon, kiu okazis la 4-an de januaro 1936.

Al ĉiuj nomitaj junaj paroj ni deziras en ilia plua kunvivo multe da felicxo kaj prosperado!

*

Belgujo. Bruselo. Antaŭ pluraj semajnoj venis tien sam. F. W. Buenting nederlanda-hinduja Cseh-instruisto, kun intenco tie vigligi la E-movadon. En la diversaj E-Kluboj de la urbo li prelegis pri la E-movado en Nederlanda Hindujo kaj pritraktis la gramatikajn kaj lingvajn detalojn de E kun laŭdinda energio li organizis kunvenojn por la tuta Brusela E-istaro kaj sukcesis decidigi la klubestrarojn al starigo de komisiono kun la celo: ĝenerala propagando kaj disvastigo de E. Tiel fondiĝis „E-ista Reprezentantaro Brusela“: sekretario sam. F.Swinnen, Nieuwentovestr. 77, Uccle-Bruxelles.

Ĉeĥoslovakio. S-anino Julie Šupichova publikigis dum 1935 140 artikolojn pri Es... La konata propagandistino sukcesis dum ...

Aŭstriaj inventistoj kiel pioniroj de l'tekniko.

De Franz Vasta, Wien.

Al la granda nombro da forgesitaj pioniroj de la tekniko apartenas ankaŭ **Peter Mitterhofer,** kiu devas esti rajte nomata la vera inventisto de la skribmaŝino; li naskiĝis 1822 en Partschins ĉe Meran en Tirolo kaj konstruis 1864 tiplevilskribmaŝinon el ligno, kiu enhavis la tiparon, la centran alfrapon de la literoj kaj la mekanikan pretersŝovon de l'papero. Tiu-ĉi unua uzebla modelo estas nun rigardebla en la muzeo Ferdinandeum en Innsbruck. Dua ekzemplero estis jam pli perfekta kaj posedis jam farbigeblajn literojn. 1870 imperiestro Franz Josef I. aĉetis de li modelon de skribmaŝino por 150 guldenoj kaj transdonis ĝin al la model-kolektejo en Viena Teknika Altlernejo; ĝi estas vera perfektaĵo de metiista laboro. Por fabrikado en granda stilo mankis al Mitterhofer la necesaj monrimedoj.

Eksterordinare talentita inventisto en soldata vestaĵo estis **Franz Uchatius.** Naskita 1811 en Theresienfeld ĉe Wr.-Neustadt en Malsupra Aŭstrio, li post finiĝo de sia militista edukado ĉefe okupis sin pri kemio kaj fiziko. En la jaro 1841 li ricevis postenon en la kanon-fabriko de Viena Arsenalo, kie li poste atingis sian mondfamon. Fariĝinte 1844 leŭtenanto, li anstataŭis la pinglon el fragmito (Schilfrohrnadel), kiun oni ĝis nun uzis por ekbruligo de l'pulvoro ĉe pafado el kanonoj, per frotpinglo (Friktionsnadel), kiu funkciu ankaŭ ĉe vento kaj pluvo. 1846 li konstruis la unuan kinematografon, ok jarojn poste li eltrovis novan metodon por konstato de l'karbon-enhavo de kruda fero. Depost 1871 komandanto de Arsenalo, li nov-ekipis la aŭstrian artilerion, aplikante ĉe la pretigo de kanon-tuboj la novan materialon



Modelo de la unua skribmaŝino.

de ŝtal-bronzo, ĝis nun ne konatan pro sia fortikeco kaj daŭremo. — La konstanta malfido kaj kaŝita kontraŭeco, per kiu li estis traktata de la superaj militistaj instancoj, ruinigis lian rezistemon. En momento de malkuraĝiĝo li 1881 mortpafis sin. Kun generalo Uchatius Aŭstrio perdis eksterordinaran fakulon sur la kampo de la artileria tekniko kaj inĝenieron, kiu dum sia tuta vivo okupiĝis pri novaj eltrovaĵoj. — Al **Johann Kravogl** el la sudtirola vilaĝeto Lana ĉe Meran (1823—1890) ni dankas la inventon de la **elektro-motoro** aŭ „elektra energi-rado“, kiel ĝi estis de li nomata. Ĝi ege vekis la intereson de la franca fizikisto Théophile Gramme, kiu ĝin perfektigis kaj enkondukis en la praktika tekniko. La modelo estis montrata en Viena Mondekspozicio 1873 kaj troviĝas nun en Teknika Muzeo de Wien. La invento de la dinamo-maŝino kaj elektro-motoro grave ŝanĝis la ekonomian vivon de la popoloj; la laborloko de la industrioj ne plu estas ligita al la proksimeco de la energi-fonto, ĉar oni nun povas konduki la elektro-energion per metalfadeno preskaŭ sen perdo ĝis distancoj de 1000 km. — Per la invento de la dinamo-maŝino estas nun ebla transformi la akvo-energion de la montaroj en elektran fluon; la tuta laborkapablo de ĉiuj aŭstriaj akvofortoj ampleksas pli ol 20 miliardojn da kilovat-horoj, de kiuj nuntempe apenaŭ 3 miliardoj estas ekspluataj.

Estis Gramme kaj Siemens, kiuj ĉerpis financan rikolton el la elektro-motoro de Kravogl, kiu restis nekonata kiel tia inventinto eĉ en Aŭstrio mem. —

(Daŭrigota.)

...sinta jaro aperigi eĥute (parte sub pseŭdo-...imo Ejš) 140 artikolojn pri E. en diversaj ...azetoj. En la grava ĉiutaga ĵurnalo Ná-...odni Politika aperis 72-foje E-kroniko, ...om 11 apartaj artikoloj; ceteraj artikoloj ...peris en Tyden rozhlasu (40), ...lesični zpravozdaj (8), Rozhledy ...). List (3), kaj Národni Listy ...ečerni (2).

Danujo: **Kiun oni deklaris mortinta, tiu longe vivos!**

El „Esperanto-Bladet" oni eksciis, ke „oni-...ro" inter la dana esp-istaro antaŭ kelka ...mpo rakontis, ke la konata dana pionirino ...E. f-ino Margrethe Noll mortis. Ankaŭ el ...ervegujo venis la sama informo. Sed feliĉe ...i baldaŭ konstatis la eraron; f-ino Noll vivas. En la pasinta numero de „Dansk Espe-...antoblad" ni legas jenan tre kuriozan ...nk-esprimon:

„Okaze de mia ĉijara morto mi kore dankas ...ajn karajn samideanojn pro la granda ...mpatio, kiun ili montris al mi, farante belajn ...emor-paroladojn pri mi kaj eĉ verŝante ...rmojn. Mi trankvile povos morti, ĉar mi ...re spertis, ke oni priploris min; el tio mi ...konkludas, ke mi ne tute vane vivis mian ...vivon kaj kun duobla forto mi penados plene ...eviti larmojn." Nollo.

Francujo. Paris. Jen la oficiala programo ...e la kunvenoj de la Pariza grupo en Sor-...onne: 7. II. Parolado-koncerto: „De la ...ntikva ĝis la moderna fortepiano", kun parto-...no de f-ino Ilstein, pianistino, kaj s-o ...erlin, antikva fortepianisto; 14. II. „Pri ...medo Marso" (s-ino Jeangirard); 21. II. ...ato pri la ĉasado kaj fiŝkaptado rilate la ...spekton al la vivo." — La Cseh-kursoj, sub ...idado de s-o Persson, komenciĝis la 6. I., ...e la prezido de s-o Maurain, membro de la ...anca Instituto, dekano de la Scienca Fakul-...to de Paris.

Franclando dum printempo.

Jen vere bela ilustrita broŝuro eldonita de ...Foiro de Paris. Ĝi volas atentigi la komerc-...ojn pri la grava fakto, ke la Foiro de Paris, ...me kiel granda nombro el ĝiaj ekspoziciantoj ...vizitantoj, uzas Esperanton. — Mendu ĝin ...„Foiro de Paris, Paris, 23, Rue N. D. des ...victoires".

Japanujo. „La Revuo Orienta" raportas ...sia lasta numero: 35 lokaj grupoj en ...lokoj havis 101 kunvenojn kaj kunsidojn, ...kursojn, 4 ekspoziciojn kaj 2 publikajn ...propagandkunvenojn.

Nederlando. Haag. Ĉiuj E-unuiĝoj de l'urbo ...en unu sola escepto organizis la 17-an dec. ...Zamenhofan Memor-vesperon. La granda salo-...no de „Amicitia", ampleksanta 500 personojn, ...estis tute plena. Ekster la tre varia programo ...(antoj, teatraĵoj) estis prezentita de s-ro ...Swestein la filmo „Tra Skandinavio". — La ...sukceso estis grandega kaj ĝi montris evidente, ...ke ĉiaj espaj societoj, malgraŭ la diverseco de ...iliaj principoj aŭ mondkomprenoj, bone povas ...kunlabori, se nur la vera Zamenhofa spirito ...regas en ili.

Polujo. Kraków. Soc. „Esperanto" aranĝis ...la 17an dec. en granda salonego de Industria ...Muzeo solenan festvesperon por memoro al ...la ŝatiĝtago de nia Majstro. Malfermis la vespe-...ron prezidanto, prof. dro Odo Bujwid, kiu ...ankaŭ uzis la solenan okazon, por mencii en ...siaj kortuŝaj vortoj pri la morto de la pola ...marŝalo Józef Pilsudski.

3. Festvespero por la Radio-lernantoj.

Marde, la 11. de februaro, 19h 30.

...la granda salonego de **Restoracio Tischler,**

Wien, I., Schauflergasse 6.

Konferencanto: Richard Kreutel.

Geaktoroj: Vi vidos!

Nur en Esperanto! Gaja vespero!

Gastoj bonvenaj! Esperanto-Klub.

Porhejmaj Taskoj.

La Esperantokurso de la radiostacio Wien daŭras jam tri monatojn: Po 25 minutoj ĉiumerkrede de la 18h 30. Kursgvidanto estas Hofrat Steiner. Ke ĝi estas atente sekvata de multaj, tion pruvas pli ol 700 alskribaĵoj de la aŭskultantoj el Aŭstrio kaj eksterlando kaj la libertemaj „porhejmaj taskoj", alsendataj por senpaga korektado al Int-E-Muzeo en Wien. — El tiuj taskoj ni publikigas ĉi-sube du tre bonajn, karakterizajn por la tre sukcesa progresado de la plej diligentaj lernantoj!

La Redakcio.

Vintroĝojoj.

La vintro donacas al ĉiu homo ian ĝojon. Kiu la vintron amas, tiu havas pli multe da vivo. Se la unua neĝo falas, ĉiuj preskaŭ ekkrias ĝoje: „Jam neĝas." Estos ankaŭ efektive bele, se la neĝeroj turniĝadas de l' ĉielo. Kiam la blanka kovrilo kovras la teron, tiam la geinfanoj kuras en la straton, ĵetas neĝbulojn, konstruas neĝovirojn kaj glitkuras sur la glitejo, kiun ili faris al si el la neĝo.

Kiu havas glitŝuojn, tiu glitkuras sur la glitkurejo. Ĉi tie estas ĉiam tre ĝojige; tie oni dancas per glitŝuoj ĉe muziko, vetkuras kun la amiko kaj ne iras hejmen pli frue ĝis estas malhele. Je la plej proksima tago oni vekiĝas kun granda ĝojo kaj frekventas ree la glitkurejon, kie oni denove amuzas sin.

Plenkreskaj personoj rodlas aŭ kuras per skioj. Ili tamen devos veturi per tramvojo aŭ fervojo en la malproksiman ĉirkaŭaĵon, ĉar proksime ne estas tiom da neĝo.

Dr. J. Bastl, wirkl. Hofrat
und Stadthauptmann i. R., Wien.

Mi raportas hodiaŭ mallongan anekdoton el la lerneja ĉambro, kiun pastro iam rakontis al mi: Mi iam rakontis al miaj lernantoj pri la mirakloj de Jezuo kaj ordonis, lerni ĉi tiujn rakontojn ĝis la plej proksima religia instruhoro. Je la sekvinta semajno ni ripetis la lerniton. Mi demandis saĝan knabon pri la mirakloj, kiujn efikis Jezuo. Tiu komencis rakonti, kiel Jezuo aliformigis akvon al vino; li sciis raporti pri la mirinda pano-plimultigo kaj kiel Jezuo faris blindulon vidanta, surdulon aŭdanta ktp. Sed subite la knabo silentis. „Unu miraklon vi forgesis, Francisko!" mi diris. La knabo meditis kaj vokis subite: „Mi ĝin jam scias, Via pastra moŝto! Jezuo faris al lamulo gambojn!"

Hans Zant, instruisto, Steinakirchen.

Anekdoto.

Sarkasme, sed klare.

Hellmesberger, la fama komponisto kaj direktoro de Viena ŝtatoperejo, ankaŭ estis fama pro sia brila spriteco. Dum lia agado en la operejo sinjoro kun la nomo Grün (Verdo) estis la unuaranga ĉefo de l' orkestro en ĉi tiu instituto. Laŭ la opinio de Hellmesberger Verdo ne estis bona violonisto, kaj lia eldiro: „Verdo estas bona por la okuloj sed malbona por la oreloj" rapide cirkulis.

Unutage nun, kiam Verdo trudeme petis pro ricevo de solistrolo, Hellmesberger rakontis al li en ĉeesto de liaj kolegoj jenan rakonteton: „Hieraŭ, mia kara Verdo, mi havis strangan sonĝon. Mi estis mortinta kaj staris antaŭ la sankta Petro, petante enirpermeson en la paradizon. Jen demandis min la sankta pordeggardisto, kiun profesion mi havis sur la tero. Je mia respondo, ke mi vivis mizere estante violonisto, Petro skuis sian blankharan kapon kaj diris al mi, ke en la paradizo ne plu estas loko por mi, ĉar tie jam estas tro multaj violonistoj. Malgaje mi iris flanken kaj pripensis, kion mi faru, kiam subite la ĉielpordego malfermiĝis iomete kaj mi povis rigardi tra fendo en la paradizon. Kaj kiun laŭ via opinio mi vidis preteriri kiel unuan? Vin, plej kara Verdo... Tuj mi denove ekparolis al Petro kaj demandis, kial mi ne

Kremsmünster, korto de la abatejo.

ricevis enirpermeson en la paradizon, dum ankaŭ mia kolego Verdo estas ene. Tiam Petro ridetante respondis: „Jes, mia kara, Verdo ja neniam estis violonisto..."

Universala Esperanto-Asocio
Ĉefdelegiteco por Aŭstrio
Wien, I., Neue Burg.

Grandaro de niaj membroj restis fidelaj kaj jam pagis la kotizon. Ni invitas ankaŭ la ĝis nun hezitemajn al repago kaj ankaŭ ĉiujn legantojn de AE al aliĝo. Pri kotizo bonvolu legi en AE 1.

Kelkaj malnovaj jarlibroj, riĉigo de E.-biblioteko, grupoj ktp. el la jaroj 1924, 1928—1931 post alsendo de š 2.30 en poŝtmarkoj estas haveblaj.

Delegitoj bonvolu varbi entreprenojn por la jarlibro 1936 kaj por „Esperanto". Koran dankon. G. Weber.

„Esperanto", fakgrupo Wien X, de „Wiener Volksbildungsverein" (Viena Popolkleriga Asocio) aranĝas sabate, la 8. II. 36 je la 19-a horo grandan amuzvesperon kun elektita esp-a programo (i. a. du unuaktaj teatraĵoj), al kiu ĝi kore invitas ĉiujn Esperantistojn. La prezentado okazos en la teatrosalono de la Komensky-lernejo, X., Wielandgasse 2. — Biletoj po 50 g ĝis 1.20 riceveblaj en la redakcio de „Verda Revuo", VII., Hermanngasse 31/26.

Aŭstria Esperanto-Asocio
Wien, I., Neue Burg (Tel. R-27-803).

Ni petas ĉiujn E.-grupojn, sendi al ni liston de siaj membroj por la jaro 1936. En la listo bonvolu indiki la membronumeron de AEA kaj ĉu la membro estas familiano („fam.") aŭ senlabora („senl.").

Por la pluvalidigo de jam donitaj membrokartoj ni preparis markojn surgluotajn sur la jarindikon de la membrokarto.

Ni petas sendi la jarkotizojn por 1936 kiel eble plej baldaŭ. Grupoj pagu per poŝtpagilo al la konto „D-123.826, Aŭstria Esperantisto" kun la indiko „AEA, 1936", unuopuloj pagu plej bone per poŝtmarkoj sendeblaj kiel presaĵo.

Tuj post ricevo de la pago ni liveros al ĉiu nova membro membrokarton (AEA kaj UEA), al ĉiu malnova membro jarmarkon kaj al ĉiuj membroj kuponaron de UEA, kiu rajtigas uzi la servojn de Universala Esperanto-Asocio. Por la estraro: E. Werner.

Ekzamenoj por la Instruado kaj Kapableco de Esperanto.

Ili okazos la 31. de marto je la 8-a per la skriba ekzameno en Bundeslehrerinnenbildungsanstalt en Wien, I., Hegelgasse 14, kaj estos daŭrigataj la sekvontajn tagojn. La koncernaj petskriboj (stampo ŝ 1.—) devas esti plej malfrue la 16. de marto ĉe la direkcio de la Ekzamenkomisiono en Wien, I., Dr.-Ignaz-Seipel-Ring (Stadtschulrat). La ekzamentakso de ŝ 20.— aŭ 10.— estu pagota en la ekzamenĉambro.

Ekzamenregularo en Bundesverlag en Wien, I., (ŝ 3.10) aŭ en librovendejo.

Aŭstrio. Novaj prospektoj kaj gvidfolioj:

Viena Foiro (8.—15. Marto 1936). 8-paĝa prospekto, bonguste presita en 3 koloroj, varbanta por la printempa foiro de Vieno. La nun venanta foiro estos XXX-a en la vico kaj kiel jubilea ĝi estos speciale konsiderata de la aŭstriaj kaj eksterlandaj ekspoziciantoj. Ĝi donos tiamaniere reprezentan bildon pri la tuta industria kaj metia kreado de Mezeŭropo. — Ricevebla senpage de „Wiener Messe A. G.", Wien, VII., Messepalast.

Eisenstadt, la urbo de Haydn. 4-paĝa gvidfolio kun 4 fotoj, prezentantaj la plej interesajn vidindaĵojn de tiu ĉarma ĉefurbo de l'aŭstria ligilando Burgenland. Ĉi tie Haydn agadis kiel muzikestro ĉe la kortego de l'princo Esterházy kaj fariĝis komponisto, fama en la tuta mondo. — La gvidilon instigis kaj tradukis s-ano fakinstr. Hans Bauer, Stegersbach. Senpage de: „Stadtrat Eisenstadt, Aŭstrio".

Graz. E.-Soc. p. Stirio. En la ĝeneralkunveno la 23. 11. 35. novelektitaj: kolonelo K. Hackl, prez.; W. Rogler, anstataŭanto kaj grupestro; d-ro W. Biehler, sekr. k. bibl.; K. Bartel, kas.; J. Turk, 2. kas.; R. Calisto k. inĝ. H. Schalko, kontrol. Kons.: C. Lossos, J. Laschatt, L. Pernegg k. lernejkons. F. Schöpfer.

Klagenfurt. Jarkunveno de la grupo okazis la 15. jan. en la restoracio de nia s-ano Winter. Prez. Müller raportis pri la vigla laboro de la grupo, Kongreso 1936 kaj la pro tio aranĝotaj aferoj. Elektoj: Müller, vicprez. Schmid, sekr. Komposch, kas. Schacherl, varbgvid. Dürrschmied.

Tirolo: Kun subteno de Aŭstria E.-Asoc. kaj la E.-grupo Innsbruck (prez. Kühbacher) s-ano Buenting el Nederl. ankaŭ ĉijare grandstile preparas kursojn en diversaj lokoj de Tirol. Ni ŝuldas multan dankon al nia energia s-ano.

Wien. E.-soc. „Danubio". Ni ricevis vere imitinde verkitan raporton, 27 paĝan, de sekr. Franz Vasta kun statistikaj tabeloj ktp., el kiu ni bedaŭre nur povas mencii kelkajn gravajn datojn: 55 membroj, biblioteko de 1130 volumoj, bildarkivo de 6000 bildkartoj kaj 15 prelegoj por lumbildparoladoj, 52 tekstoj pri ĉefe teknikaj kaj kulturhistoriaj temoj. 50 societkunvenoj! Bela statistiko, kiu rakontas pri granda laboro kaj emo al Esp.

Esperanto-Klub, Wien havos sian ĝeneralan kunvenon marde, la 25. de februaro 1936, precize je la 19h en sia klubejo. Wien, I., Wallnergasse 6.

Dua Festvespero por la Radio-lernantoj.

La 14. jan. Esperanto-Klubo aranĝis duan festvesperon speciale por la Radio-aŭskultantoj. Pli ol 200 personoj ĉeestis.

La interligajn vortojn parolis la klubprez. kaj Radio-kursgvidanto en Esperanto kaj kun streĉa atento la lernantoj aŭskultis kaj laŭ iliaj mienoj oni povis ekkoni, ke ili bone komprenis. La geaktoroj estis preskaŭ nur Radio-aŭskultantoj: koncertkantistino **Elsa Sgalitzer,** kantistino **Mathilde Gangl** kaj operkantisto **Hugo Sterne** faris veran ĝuon per bonega kantado de kantoj el operoj kaj operetoj, verkistino **Yvonne Stepan** deklamis du proprajn ĉarmajn legendojn kaj **August Schlerka** humore kantis al la liuto. S-anino **Maria Fiedler** bonege akompanis sur la piano.

Gefiancigis

samideano Franz Stanke, prezidanto de la Esperantogrupo Krems kaj delegito de UEA, kun samideanino Maria Krautsberger, kasistino de la sama grupo. Ni kore gratulas.

Advokato **d-ro Karl Postl jun.**, nia s-ano, malfermis sian kancelarion en Wien, 7., Mariahilferstraße 38—40.

Bonvolu sendi **interesajn kontribuaĵojn** pri Via popolo, lando aŭ alia temo! Ni publikigos ilin volonte en „Aŭstria Esperantisto".

En venonta numero:

Artikoloj: „Salzburg" de E. Werner, „Romantiko sur la insulo Ambon" de Haccou en Batoe, Ned. Hindujo, „Eluzado de E. en praktikaj celoj" de V. Majnov, Leningrad.

Germana Ŝlosilo aperos meze de februaro en Albrecht-Dürer-Verlag, Wien, VII., Bandgasse (Esp.-fako). Pri prezoj rigardu n-ron 1 de AE. — Nia redakcio peros viajn mendojn!

La membroj de **Esperanto-Klubo,** Wien, I., Neue Burg, deziras korespondi kun gekongresontoj!

Poŝtistoj, Telegrafistoj, Telefonistoj. „La Interligilo de l'P. T. T." via organo. Paris 15, 324 rue Lecourbe eldonas la tutmondan profesian adresaron vian. Por membroj senpage.

Recenzoj.

Sud-Mancuria Fervoja K-io, Dairen, Sud-Mancurio, dissendas ĵus aperintan „Gvidfolion por Vojaĝantoj en Mancoŭkuo", senpage ricevebla. Skribu simplan poŝtkarton en Esp. al la supra adreso.

Utop anno 2000. Bericht über die erste Tagung des Internationalen Intersäkularen Weltverbandes der Utopisten (10.—17. Juni 2000). — (Utopiista kongreso en la jaro 2000. — Raporto pri la unua kongreso de Internacia Interjarcenta Mondasocio de Utopiistoj, 10.—17. Junio 2000). — Verkis Peter Norelli. Eldonejo „Fiba-Verlag", Wien—Leipzig. 182 pĝ. Prezo broŝurite 4 aŭ ŝ 40 groŝoj.

Jen titolo de tre interesa germanlingva libro ĵus aperinta; ĝi pritraktas en formo de raporto pri „utopiista Kongreso" nian socian kaj privatan vivon el la vidpunkto de la jaro 2000. Ĉar en la jaro 2000 regas — laŭ la nomita libro — idealaj rilatoj: en la jaro 2000 estas jam solvitaj ĉiuj ekonomiaj krizoj, ĉiuj politikaj krizoj, ĉiuj kulturaj krizoj, ĉiuj problemoj de l'amo kaj edzeco. Sur tiu supro de l' teknika civilizo povas la animo de la homo ree sin dediĉi al trankvila konsideremo, spirita ripozo, ne-nervoza celado kaj tiamaniere reveni al la fundamentoj de vera kulturo. La mondkonceptoj de la plej grandaj saĝuloj kaj sociologoj de l'homaro — de Sokrato, Platono, Thomas More, Francis Bacon, sankta Aŭgusteno, Campanella, Bellamy ĝis Silvio Gesell kaj Coudenhove-Kalergi estas tie ĉi prezentataj kaj (en formo de diskutoj) kritike prilumataj. Jam pro tio la libro estas tre interesa kaj rekomendinda al tiuj, kiuj deziras konatiĝi kun la idearo de la „grandaj utopiistoj". — Pri Esperanto la libro enhavas nur unu frazon en la antaŭparolo, sed tre multediran: „La diskutoj okazis memkompreneble en la lingvo Esperanto kaj estis nur por la celoj de publikigo tradukitaj en la ĉefajn naciajn lingvojn." — Laŭ nia informiĝo baldaŭa aperigo de la libro en Esperanto estas tre verŝajna. D-ro E. Pfeffer.

Stepan Mišák, Adana, Turkujo, eldonis 2 volumetojn po 38 pĝ. „Tra Mistera Oriento aŭ miaj memoraĵoj", „Edzeca Vivo" ambaŭ malgrandformate po 2 resp. kuponoj.

Rekomendataj:

Cigaroj kaj cigaredoj de **Oesterreichische Tabakregie** famaj kaj preferataj en la tuta mondo pro sia kvalito.

Nia oficiala kongresasekurejo „Der Anker" Wien, I., Hoher Markt 10—11, donas ne al la kongresanoj, venontaj el iu Eŭropa Lando escepte Rusujo, por asekuro de pakaĵoj kaj kontraŭ akcidentoj en la daŭro de 1 monato jenajn speciale favorajn kotizojn: I. sfr. 2.35 a) por pakaĵasekuro je ŝ 500.— b) por akcidento: ŝ 2500.— je morto kaj ŝ 5000.— je daŭra invalideco; II. sfr. 4.55 a) je ŝ 1000.—, b) ŝ 5000.— kaj ŝ 10.000.—. Mendo kaj pago kun la kongreskotizo al LKK.

La ĉapelo **„Esperanto"** el la fabriko **Carl Ceschka & Söhne,** Wien, VII., Kaiserstraße 123.

La tramvojo al **„Pöstlingberg"** en Linz.

La termejo **„Warmbad Villach".**

„Aŭstria Festo je honoro de Bruckner" Linz - St. Florian, 18.—21. VII. 1936.

Bad Ischl, la plej frekventata salbanlo en Aŭstrio.

Hotel de France, Wien, I., Schottenring. Tel. A-17-5-75. Unuaranga familia hotel.

Venu ankaŭ vi al la fabele bela, ma multekosta **Steiermark.**

Grafologia angulo
red. Josef Hofmann

Scivolemulo: La ekzakta, senprema kr skribaĵo kun vortformado malkovras ind dualecon, kiu malgraŭ granda sentemeco aktive kaj memregante sin prezentas. sentzono ne povas multe efiki, ĉar la regula intelekto superas. Sisteme kun rektli akurateco, kiu kelkfoje proksimiĝas al ped teco, laboro estas komencata kaj per s granda energio finota. Interesa estas evidenta teoretika atakemo, kiu estas kond ita de vigla kritiksento. Reale la skribi observas la aĵojn de la mondo kaj tiamani li prijuĝas ĉion. Bela stilo kaj formo es bezono de la aŭtoro.

Kvadratenigmo.
De Karl Haager, Wien.

	1	2	3	4	5
1	a	a	a	a	g
2	i	i	m	m	m
3	n	n	o	o	o
4	o	o	o	p	r
5	r	r	r	s	s

Oni ordigu la literojn tiamaniere ke donu de maldekstre dekstren kaj de supre m supren vortojn de jena signifo: 1) ĉefurbo eŭropa respubliko; 2) bonodor; 3) literatu verko; 4) spirita vido; 5) tono, daŭre sonan

Ĉe 3) kaj 5) finvokalo forlasi...

Eigentümer, Herausgeber und verantwortlicher Redakteur: Hofrat Hugo Steiner, Bi amberg, Bunde straße 154. **Druck: Buch-, Kunst- und Z itungsdrucker „Albrecht Dürer", Wien, VII.,** Bandgasse 28.